

MI AMAS VIN



Aŭtoro
Michael Ross

Ilustristo
Bruno Iradukunda



**HELPANTE INFANOJN
BATALI KONTRAŬ KOVIM-19**

NABU

La Misio de NABU

NABU estas neprofitcela organizo bazita en Novjorko 501(c)(3). Ĝia misio estas solvi la malekvilibron rilate al kreado kaj disvastigado de porinfanaj libroj, por ke ĉiuj infanoj povu legi kaj kreski je sia plena kapablo. Ni disrompas la ciklon de malriĉeco utiligante teknologion por publikigi porinfanajn librojn senpage en retaj medioj, en denaskaj lingvoj.

Pri la Kolekto Sano - KOVIM-19

Dum tiu ĉi libro estas publikigita en aprilo 2020, la mondo alfrontas tutmondan pandemion kiu trafos infanojn kaj iliajn familiojn en ĉiuj landoj. Kiel rezulto de KOVIM-19, ĉirkaŭ 1,37 miliardo da lernantoj tutmonde estas for de sia lernejo kaj alfrontas interrompojn en sia lernado. Kiel cifereca platformo, NABU provizas la plej vundeblajn infanojn per hejmaj rimedoj por certigi ke ili povas resti sekuraj kaj daŭrigi sian lernadon. Cetere, misinformado pri la viruso estas ĉie. Gepatroj kaj familioj bezonas aliron al ĝustaj informoj kaj sentemaj vojoj alparoli siajn infanojn pri la viruso, por helpi teni ilin kaj siajn komunumojn sekuraj.

Responde al tio, NABU kreis tiun ĉi kolekton kun la subteno de fakuloj pri sano, neŭroscienco kaj infandisvolviĝo, kaj ankaŭ de teamo de verkistoj kiuj kontribuis por krei informriĉajn kaj konvinkajn rakontojn. Kreitaj en Ruando kaj ilustritaj de mirindaj ruandaj desegnistoj de NABU, la rakontoj estis publikigitaj en la ruanda lingvo (kinyarwanda) kaj ankaŭ alilingvigitaj por tutmondaj familioj. Kie ajn vi legas, ni esperas ke vi kaj via familio restos sekuraj kaj ke tiu ĉi rakonto alportos al vi kuraĝigon kaj esperon por pli brilaj tagoj.

This work is licensed under the Creative Commons Attribution-NonCommercial-NoDerivatives 4.0 International License. To view a copy of this license, visit <http://creativecommons.org/licenses/by-nc-nd/4.0/> or send a letter to Creative Commons, PO Box 1866, Mountain View, CA 94042, USA.



MI AMAS VIN

Aŭtoro

Michael Ross

Ilustristo

Bruno Iradukunda

Direktoro de kreado & Editoro

Michael Ross

Translation Completed by

Manuela Burghelea



“Panjo, kial mi ne povas vidi Avinjon kaj Avĉjon? Ĉu ili ankoraŭ amas min?”



“Mia kara Kwizera, ili amas vin pli ol ion alian. Ili amas vin tiom multe kiel la sunon. Ili amas vin tiom multe kiel la sonon de ondoj dancantaj surstrande. Ili amas vin kiel birdoj kantantaj matene. Ilia amo por vi estas same senfina kiel la ĉielarko. Sed ne estas sekure por ili vidi vin nun.”



**“Pro la nova kronviruso?” demandis Kwizera.
“Ja karulino”, respondis ŝia patrino. “Sed mi ne estas
malsana! Mi estas sana kaj mi volas ludi kun Avinjo kaj
Avêjo. Tio ne estas justa!” diris Kwizera.**



Kwizera ploris:

“Mi volas ludi kaŝludon kun ili. Mi volas ludi futbalon kun ili. Mi volas ke Avĉjo legu mian plej ŝatatan rakonton ‘Kazungu’ kaj mi volas ke Avinjo kantu mian plej ŝatatan kanton ‘Kabuye Kanjye’. Mi sopiras ilin.”



**La patrino de Kwizera respondis milde:
“Vi pravas, vi estas tre sana. Sed la viruso ne trafas
junajn infanojn en la sama maniero en kiu ĝi trafas
maljunulojn. Eĉ se vi ŝajne ne malbonfartas kaj vi sentas
vin forta, vi povus havi la viruson, kaj tio signifas ke
Avinjo kaj Avĉjo povus esti infektitaj de vi.”**



“Ĉu tio signifas ke mi neniam povos revidi ilin?”

La okuloj de Kwizera ŝvelis kaj ŝia patrino brakumis ŝin kaj respondis, “Kompreneble ne, Kwizera. Mi havas ideon! Vi daŭre povas vidi ilin, sed ni devas teni sekuran distancon de ili ĝis kiam disponeblos kuracilo por preventi kaj kuraci la viruson.”




“Kiel ni faras tion, Panjo?” demandis Kwizera.

“Nu, ni povas iri promeni, nur ni du, ĉar ne estas sekure esti en granda grupo. Ni povas piediri ĝis la domo de Panjo kaj Paĉjo kaj vidi ilin per la fenestro.”



“Sed ĉu mi daŭre ne povos brakumi ilin kaj diri al ili Mi amas vin?” suspiris Kwizera.

“Vi povas, karulino. Vidu, amo estas unu el la plej potencaj donoj en la mondo. Amo povas vojaĝi tra la plej dikaj muroj, super la plej altaj montoj, sub la plej profundaj valoj. Nenio povas haltigi amon. Do ilia vitra fenestro ne estas egalulo por via amo.”



“Ĉu ni do povas preteriri ilian domon ĉiutage, por ke mi kriu Mi amas vin, por ke ili sciu kiom multe ili mankas al mi?” demandis Kwizera entuziasme.

“Mi promesas ke ni povas fari tion ĉiutage, ĝis kiam la viruso estos venkita kaj ni ĉiuj povos esti kune denove.” diris ŝia patrino. “Ni iru viziti ilin nun!”



“Hura!” saltis gaje Kwizera kaj ili promenadis ĝis la domo de Avinjo kaj Avĉjo. Kwizera mansalutis, blovetis kisojn kaj kriis - “Mi amas vin!” - ekzakte kiel ŝi diris ke ŝi farus. Ŝi sentis sin feliĉa sciante ke ŝi povos sendi sian mesaĝon al siaj geavoj kaj ke ŝi revidos ilin morgaŭ.




Revenante hejmen, Kwizera demandis ŝian patrinon, “Ĉu ĉiuj infanoj devas teni distancon de siaj geavoj nun?”

“Jes kara,” respondis ŝia patrino. “Ĉie en la mondo, infanoj tenas sekuran distancon, sed ili daŭre sendas sian mesaĝon de amo al siaj geavoj, same kiel vi.”



Mi amas vin Avêjo Agwé!




Mi amas vin Avinjo Mutya!



Mi amas vin Avinjo Izabel kaj Avĉjo Lucas!



Mi amas vin Lao Lao!



Mi amas vin Avinjo Elsie!

NABU

Pri la rakontoj de NABU

NABU kreas porinfanajn rakontojn kun kultura vidpunkto. Infanoj kiuj estas enkondukitaj al pluraj kulturoj kaj lingvoj havas pli grandan probablon iĝi tutvivaj lernantoj kaj kompatemaj tutmondaj civitanoj. Ni kredas ke rakontoj kulture signifaj kiuj rivelas tiun, kiun la infanoj vidas kiam ili rigardas en la spegulo, helpas disvolvi sanan memestimon kaj fiersenton, kaj ke infanoj kiuj lernas pri kulturoj aliaj ol sia havas multe pli grandan probablon formiĝi kiel plenkreskuloj kiuj aprezas la dignon de homa vivo kaj la plibonigadon de la mondo por ĉiuj.



BRUNO IRADUKUNDA

e. iradubru@gmail.com

m. + 250 783 241 528

Bruno IRADUKUNDA estas artisto kiu laboras kun pentrado, ilustrado, skulptado kaj grafika desegnado. Li ilustras porinfanajn librojn ekde 2017. En 2018, la Internacia Komisiono pri Libroj por Junuloj (International Board on Books for Young People, IBBY) premiis Iradukunda kiel unu el la plej bonaj ilustristoj de la jaro por liaj ilustraĵoj en “La Troisième Perle”, verkita de Kai HIRWA kaj publikigita de EDITIONS Bakame. En 2019, Iradukunda ricevis diplomon de la Grupo de la Monda Banko por partopreni en “preta por legado” en Ruando. Bruno starigis freŝdate sian propran artatelieron en Ruando.

MI AMAS VIN

NABU

nabu.org
110 East 25th Street,
New York, NY 10010